# NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
☎ lunde vespere (91) 530 87 98
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz

MARTO 1995


## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

**Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°**

Marde/ĵaŭde, ekde la 18,00 ĝis la 20,30 h. funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 8079

Ĉe kafejo "Villa de Madrid", sub la ĝardenoj de Colón okazas parolrondo la 1-an kaj 3-an merkredoj de ĉiu monato. Kutime gvidas Ana Manero.

En Centro Cultural "Maestro Alonso" (Ventas) merkrede je la 18,30 h okazas baza kurso de esperanto.

Prelegoj dum venontaj monatoj, ĉe MEL je la 19,00 horo.

13-an marto. "La Zamnehofa reformo pri supersignoj". J. Navareño
17-an aprilo. "La tempo kaj la spaco eble mezuritaj en decimala sistemo". L.Ojer
8-an majo "Propad: Esperanta urbo". (video) J.C. Ruiz
junio "Zamenhofaj vortoj en Boulogne-sur-Mer". F. Moral

## "Nia voĉo" DISTRIBUADO

Pro la altigo de la poŝtmark-prezo:15 PTA por Madrido kaj 19 por provincoj ni nur sendos **EKDE APRILO** al jenaj: membroj de MEL kiuj pagis 1994an kotizon, hispanaj esperantaj grupoj kiuj sendas al MEL siajn revuojn. Aliaj grupoj povas ricevi ĝin kontraŭ 68 poŝtmarkoj po 15 PTA (1.020 PTA).

(PTA < > pesetoj kiel $ < > dolaroj, laŭ ISO-Internacia Standara Organizo)

NI DANKAS AL GRUPOJ KAJ SIMPATIANOJ KIUJ JAM SENDIS POŜTMARKOJN

## GUINNESS REKORDOJ

En siaj novaj eldonoj (1995,p.85), la fama Libro de Rekordoj Guinness denove aperigis artikoleton pri esperanto, lingvo sen malregulaj verboj.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

★ Printempa renkontiĝo en Altaj Tatroj. Propad (Slovakio) 5-7an de mayo
★ 2-a Esperanto Eŭropa-Unio Kongreso. Parizo 2-6an junio "Etnoj kaj Naturo". 26an junio ĝis 5a de julio. Poprad (Slovakio)
★ 47a Kongreso Int. Fervojista Federacio. Pécs (Hungario). 20a-26a de majo
★ 29an-301n aprilo. 6a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio. Alquerias (Murcio)

Venontaj UK: 1995-julio-22/29a. Tampere. Finlando ★ 1996-julio-20/22. Prago ★ 1997-julio-19/26. Adelaido (Australio).

## ESPERANTO EN TV

La tele-emisoro "Antena-3" en la serio "Los felices años" aperigis scenon en kiu rolulo tradukas esperantan leteron de la jaro 1939.
En multaj katolikaj landoj naciaj-TV elsendis Papan novĵaran salutvortojn en pli ol 50 lingvoj, inter ili esperanto: "Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron".

## *KOTIZO POR 1995 KUN DONACO*

*La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj tri jaroj. Bv.* ***sendi ĉekon po 2.000 PTA,*** *je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭ dankon por via kontribuo al daŭrigado de MEL.* ***Se vi pagas rekte ĉe la Liceo (lunde vespere) vi ricevos kiel donacon, la libron "Historia del Esperanto en Madrid",*** *dulingva versio verkita de Lupe Sanz Bueno. Se via kotizo estas pagata aperas "P" antaŭ via membro-numero en la etikedo, kontraŭe vi ŝuldas 1995.*

ADRIANO DEL VALLE

Dum februaro okazis antologia eksposicio organizita de la Madrida Urbodomo kiu montris la tut-artistan flankon de la seviljano. La Liceo profitik la okazon ke la poeto de la hispana generacio de la 27a estis bopatro de la membro de MEL Luis Ojer kiu dum multaj jaroj estudis kaj kolektis verkojn de la fama Luis parolis kaj montris lumbildojn kaj diversajn materialojn de Adriano kiel verkisto, pentristo kaj bonhumora persono. Li sekvis la "ultrisma" skolo kaj parolas pri esperanto almenaŭ en unu el siaj poemoj.

HISPANIO

En Castellón CNT-grupo kreis "taller de esperanto" en la sidejo de "Suport Mutu" . Ili havas bibliotekon kaj petas kunlaboron. Adreso: Apdo 560-12080 Castellón.

Ankaŭ en Castellón la bahaa grupo inaŭguris ekologian domon, lernejon bahaan kaj esperantistan. Inés Comabella, Urb. Tossal Gros,24-12004 Castellón.

Ĵurnalo "La Chuleta" de Murcio, kiu distribuas senpage en la Univesitato la regionan ĵurnalon "La verdad", publikigis tut-paĝan artikolon pri esperanto laŭ iniciato de Dr. Pérez Óvilo.

*HEF ANGULO (Ne oficiale)*

La Liceo ricevis diversajn demandojn pri la Hispana Kongreso de 1995, ni demandis telefone al HEF sed ĉe CO ne scias ankoraŭ la nomon de la urbon.

ALTERNATIVA MILIT-SERVO

La sidejo de MEL ricevis peton de esperanta simpatiano, kiu deziras milit-servi for de la armeo. Juan Carlos Ruiz parolis kun autonomaj autoritaj por studi la eblecon de oferi oficejan postenon ĉe HEF aŭ aliloke.

SONBENDA REVUO

Ni jam parolis antaŭe pri la kaseda revuo farita de ge-sinjoroj Goralski en bonnivela esperanto. Ili ankoraŭ daŭrigas la eldonon de ĝi. Se vi deziras ricevi ekzempleron sendu 90 min kasedon al jena adreso: Kristina Goralski, str. Gral. Fanjul 17-1°-D, ES-38006 Santa Cruz de Tenerife.

NUR POR KOLEKTANTOJ

Liceo havas malgrandan stokon de la libro "El esperanto en 20 leciones" de V. Inglada. Eldonita en 1931. Ni sendos tiu-ĉi libron plus "Seminario pri sporto-1982 (kun sporta terminaro en esperanto)" nur po 1.000 pesetojn (inkludas sendokoston). Antaŭ pago necese pere de poŝtmandato al Liceo.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal

LUCRECIA SAN ANTONIO
C/ Meléndez Valdés, 47
28015 MADRID
479